
# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

http://satesperanto.free.fr/ *** retadreso: satesperanto@free.fr







ĈU LA FENOMENO NUR EN JAPANIO?

Marto 2006 77-a jaro, n-ro 3 (1209)
MENSUEL / MONATA
ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

# 8-a de Marto - Internacia ina tago

## JAPANA KONSTITUCIO

Kiel eble vi jam aŭdis, en Japanio troviĝas ondo kiu emas ŝanĝi la 9an artikolon de la Konstitucio. Laborgrupanoj de reganta partio por ŝanĝi la konstitucion, samtempe proponas "rerigardi" la 24an, kiu garantias al homoj "estimon de individuo" kaj "egalecon de ambaŭ seksoj". Krome ili volas aldoni al konstitucio "devon por zorgi familion" kiel "devon de nacimembro".
Kial?!
Civitgrupo, "Ne perdu genro-egalecon el la konstitucio",http://blog.livedoor.jp/savearticle24/ organizas kampanjon : "Haltu! Ne ŝanĝu la artikolon 24", kaj klarigante kialon avertas tiel.

*-- Ĉar en nuna novliberalisma strukturo, ili volas transdoni de ŝtato respondecon de sociala bono por zorgi pri senlaboristoj, malriĉuloj, maljunuloj, infanoj kaj handikapituloj al familio, precize al virinoj,*
*En lastatempe proponita nova konstitucio de ili, ĉe la antaŭskribo ili difinis Japanion tiel:"... la lando gardata de nacimembroj, kiuj amas ĝin". Tio implice devigas al homoj naciismon kaj trudas devon de nacidefendo.*
*Plie, ili devigas al homoj pli grave trakti "komunan profiton" kaj "publikan ordon" ol individuajn homrajtojn. Tiamaniere, ili celas ŝanĝi nunan konstitucion kiu konsistas el 3 kolonoj, "paco, homrajto, popola suvereneco" al tia, kie nacimembro servus al "publiko", familioj fariĝu subfunkcio por ŝtato.*
*Ni atente gvatu vortojn de S-ro Kaiken, por ke ĉiuj povu vivi kun estimo en kiaj ajn vivstiloj laŭ libere memelektitaj, ne estante malliberigitaj de altrudita modelo por "viro" "virino" "familio".--*

Ĉi tiu civitgrupo eldonas ilustritan libreton "S-ro Kaiken (S-ro Konstitucio-ŝanĝo)" kiun vi rigardas en frontpaĝo de ĉi tiu numero, por alvoki ĉies atenton.

Kvankam tio estas okazanta en Japanio, historie samaj fenomenoj estas rigarditaj en diversaj lokoj. Kiam regantoj fortigas naciismon, ili mobilizas familion, dirante al viroj "brave batalu!", al inoj "gardu hejmon kaj estimu vian soldaton!". Kiel inoj rifuzas tian rolon, viroj ankaŭ plenrajtas rifuzi la rolon. Regantoj konstruas muron inter ni diversmaniere. Preteksto de aparteno al iu sekso aŭ nacio estas tipa muro. Por ni Internacia Virina tago povas esti Sennacieca Ĉies tago por malkonstrui tian muron, kiu rabas el ni individuan rajton kaj memvolan solidarecon.

Viola, el Japanio



## Ĉiuj kune por la egaleco de seksoj kaj homaj rajtoj !



## Rajto al memdecido pri aborto

Milope, la italaj virinoj timas la malaperon de abortrajto. Ĉu, eble baldaŭ, ne plu estos permesita al italianinoj, aborti? Fonto de tiu maltrankviliĝo estas la multaj atakoj kontraŭ la abortrajta leĝo. La papo nutras la polemikon, oftigante deklaraciojn kontraŭ la aborto. La dekstra registaro kun parto de maldekstraj katolikoj petas registaran enketon, rilate la aplikadon de tiu leĝo. Ĉu paŝo direkte al ĝia reekzameno ? En jaro 1978-a leĝo pri abortrajto estis akceptita.Post tri monatoj ĝeneralaj balotoj okazos en Italio. Malmultaj estas la politikaj partioj, kiuj kuraĝas fronti la fulmojn de Vatikano, batalante por ke tiu leĝo ne plu validu.

Anne Raurich

## Virina tago




Alvenas la Virina-tago. Mi ne atentis pri tio. Kaj imagu ke subite, oni starigis antaŭ miaj okuloj ankoraŭ plenplenaj je dormo, tiun krudan demandon :
- Kion vi faras, kamarado, en via taga vivo por « mildigi, helpi, justigi » la vivon de la virinoj de via ĉirkaŭaĵo ? Hmm ? Kion ?
Mia respondo tujis : « Nenion. Absolute nenion. Almenaŭ, absolute nenion specifan ».
(Verŝajne mi respondus alimaniere, se la demando estus « en via nokta vivo » kvankam kun la aĝo...sed tio estas tute alia temo..)
- Kial ? Mi mem starigas tiun pluan demandon. Ĉar mi opinias ne nur ridinda, kaj eĉ danĝera por la virinoj mem, ke « iŝi » havu tagon (el 365, eĉ foje nur el 366) same kiel Mozart, la katoj aŭ la sud-francaj kolbasoj.
Mi ankaŭ rifuzas konsideri virinaron kiel socian kategorion. En mia ĉirkaŭaĵo, mia edzino - virino - centfoje malpli bezonas helpon ol mia najbaro kiu post maldungo alkroĉiĝis al botelo, kiun, eĉ sen groŝo en poŝo, li ne plu kapablas rezigni.
Mi ankaŭ taksas tute ne racian, la devigon havi 50% da virinoj en diversaj instancoj. Kial ne 7,2% da samseksemuloj, 1,4 da nigruloj kaj 0,816% da kalvuloj ĉar ankaŭ ili suferas diskriminacion ? Nu, por mastrumi urbon - ekzemple - oni bezonas spertulojn, ĉu virajn ĉu inajn en ajna proporcio. La celo ne estas konsistigi parojn por prezenti folklorajn dancojn !
Mi tute konscias, ke ekzistas problemo pri virinoj (mi eĉ konfesu ke virinoj konsistigis mian ĉefan problemon en la vivo ;-) sed virino-tago, 50%-ineco, kaj ceteraj, estas nur solv-ŝajnigoj supraĵaj, « por-al-okul »-ecaj, ne efikaj, eventuale kontraŭ-efikaj.
Ekzistas por mi unu nura problemo : tio estas ekspluatado de homo (kiun ajn sekson ĝi havas) far homo (kiun ajn -bis-). La virina kondiĉo estas entenata en la supra frazo.
Konkludante, mi tamen devas konfesi, ke mi komplete fajfas pri la problemoj de burĝulinoj, « iŝiaj » submetiĝo al siaj samklasaj viroj absolute ne malhelpas mian dormon.

Serge Sire

## EL LA REDAKTEJO...



Karaj,
denove mi turnas min al vi per tiu ĉi redaktora kolumneto esperante ke vi legos ĝin. Nome, ofte mi faris invitojn al reagoj kaj petis viajn opiniojn. Bedaŭrinde plej ofte estis sen sekvo. En la lasta numero mi petis vian opinion pri la ŝanĝoj faritaj en Sennaciulo. Ĉu vi preferas ĝin en iom ŝanĝita formo aŭ la antaŭan aspekton? Kion vi ŝatus ke ni ŝanĝu en la gazeto por ke ĝi aspektu pli juneca kaj estu pli altira ? Oni povas nenion fari sen koni viajn dezirojn kaj opiniojn.
Ankaŭ ni petis ke vi anonciĝu por la nova redakta skipo. Ĝis nun praktike alvenis neniu kandidatiĝo.
Kiel vi povas konstati, tiu ĉi numero estas ĉefe dediĉita al niaj inoj okaze de la Internacia ina tago. Kunlaboris en ĝi sufiĉe multaj personoj, kaj ankaŭ la frontpaĝo ne estas elekto de la aktuala redaktoro sed de kunlaborantoj. Mi invitas vin daŭrigi tiel ankaŭ por ĉiuj venontaj numeroj de Sennaciulo. Tiel vi vere estos aktivaj membroj de SAT.
Okaze de la "8-a de marto" - kisojn al ĉiuj kamaradinoj,

Via aktuala Redaktoro


Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: http://satesperanto.free.fr
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA : **satx-s**
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin, Viola, C. Orsingher, Snajpero, I. Moĉilnik kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Krešimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

❐

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55 €.
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
N° CPPAP 0510 G 86567
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.


## ĈU MALDECAS PAROLI PRI APARTAJ INECAJ PROBLEMOJ ?

Oni povas demandi sin ĉu la fakto ke estas jara tago dediĉita al iu aparta temo (kiel tago de la virinoj) estas bona aŭ malbona evento ?
Ĉu sin kaŝas malantaŭ tio la nenifarantoj ? Ĉu estas momento rememorigi al la homoj aferon kiu ne sufiĉe bone evoluas aŭ eĉ retroiras ?
Miaflanke, mi pensas ke estas momento por informi pli profunde pri iu temo kies situacion la homoj ne konas. Same estas momento por instigi aktivi tiujn kiuj ĝis nun estis neagemaj. Same kiel post sekvo de konferenco pritema certaj engaĝiĝas. Ĉu diversaj grupoj profitas la okazon por interveni al la regantoj kaj obteni progreson?
Mi demandis min, ĉu post mia alvoko en la SAT-diskutejo al verkado tiutema por marta Sennaciulo, (tio kio instigis Serge Sire(n) reagi "humure ?" -vidu lian tekston en la nuna Sulo), mi mem verkos ion.
La eventoj favoris mian partoprenon. Unue televide juna kenjana virino kiu suferis fruaĝe pro ekscizo venis por prezenti libron en kiu ŝi klarigis siajn suferojn kaj la evoluon iom pozitivan pro konsciiĝo de la virinoj kiuj iom post iom konscias ke ili povas lukti kontraŭ tiuj barbaraj kutimoj (ŝia propra patrino rifuzis ekscizigi siajn du lastajn filinojn). Parolis ankaŭ franca urologo Pierre Foldes kiu sukcesas rekonstrui la difektitan vulvon de tiuj vunditaj virinoj uzante teknikon kiun li uzas por plilongigi penison de viroj (www.afrik.com/article6941.html en la franca)
Due, hazarde, mi reprenis malnovan numeron de "Laŭte" (n° 171 majo 2004) por legi dum vojaĝo al mia semajna deĵorado ĉe SAT. En ĝi estas longa 7paĝa artikolo "Sanga afrika infero" de Michal Petruzalek (2002) esperantigita de Lubomir Streda. Ĝi entenas 7 partojn el kiuj mi elektis la duan kies titolo estas : HORORO.
" En la domaĉo, sur kapra pelto, kuŝas tre juna knabino, verdire ankoraŭ infano. Ĉirkaŭ ŝi sidas ŝia patrino, onklinoj kaj avino. Ĉiuj forte tenas ŝiajn brakojn kaj gambojn, post ŝi staras ŝia baptopatrino kaj en la mano tenas razilon. En la momento, kiam la knabineto por tempeto cedas en sia malespera penado liberigi sin, ŝi entranĉas rustan ilon en ŝian klitoron. Elŝprucas fontano de sango, la knabino furioze baraktas, freneza de doloro kaj timego strebas kovri per manoj sian genitalon. Sonoj, eliĝantaj el ŝia gorĝo, forpelus eĉ senkoran lupfantomon. Sed ŝia penado estas vana, brakoj de la parencoj estas tro fortaj... "silentu" insultas ŝin virinoj "ja nenio trafos vin, tio ĉi estas neevitebla !"
La knabino bonŝance fine svenas kaj makabra operacio povas daŭri plu. Ĉifoje estas tranĉitaj vulvaj lipetoj kaj lipoj,



*La beleco de la inoj Masai*

sub "pacientino" disfluas helruĝa sango, kies odoro momente allogas centojn da nesatigeblaj muŝoj. Ili moviĝas eĉ sur la vundo, kiun "operaciantino" ĵus desinfektis per bova urino...
Korpon de la knabino eĉ spite kompateman svenon obsedas neregebla konvulsia tremo. Al tio ŝia patrino reagas per kelkaj abruptaj vangobatoj, post kiuj kompatindulino reakiras konscion. Ŝi kuŝas sur lito el branĉoj kaj la pelto sub ŝi estas plena de sorbita sango. La muŝoj estas ĉie. "Mi mortas..." ŝi ĝemas kaj esperas, ke ĉio okazis tiamaniere, kiel preskribas tradicio. Se ne, ŝi devos submeti sin al tiu ĉi makabra torturo ankoraŭ unufoje. Venas mateno, sangado ĉesas kaj la knabino, kiu ĉion mirinde supervivis ŝanceliĝas inter domaĉoj kaj per foresta rigardo esploras sangan brulaĵon de viva karno, en kiun transformiĝas ŝia generilo.
"Mi scias, ke tio estas neevitebla, alikaze neniu interesiĝus pri mi. Mi hontas ke mi kriis", flustras ŝi al sia patrino.
Ĉe la fajrejo ĝis nun dancas senlacaj persistemuloj. Venontan fojon, ŝi jam povos danci kun ili. Sed verŝajne ŝi ankoraŭ ne povos amori. Se jes, doloro, kiun ŝi dum tio spertos, superos kion ajn, kio estu al juna knabino agrabla. Tio estas Kenjo en la jaro 2002..."
En la reto eblas traserĉi paĝojn tiutemajn, ili abundas, mi esperas en diversaj lingvoj (ni preferus esperante). Konklude, mi opinias ke se tago pri iu temo ne estas sufiĉa por solvi problemojn, sed tamen estas okazo informi homojn pri situacio de homoj en la mondo kaj instigi al lukto kontraŭ ĉiuj maljustecoj al homoj. Virina tago ne malebligas diri "Viroj kaj Virinoj el la Tuta mondo unuiĝu".

Tereza